GISTO - FEB - 2002.
VASKE, Georgo Otto
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-Rs
Senpage disdonata legaĵo
Lunĉejo Tutty's. - Porto Alegre-RS

PRAKTIKADO

Ne mi, povra oldulo, devas predikadi al nia kompanaro que, sen ada pratiko, neniu lernos flue paroli iun ajn lingvon, same ne nian, la plej facilan. Se al ni ege mankas oportunoj kunsidi kaj babili, dum oni gaje bierumas. Estas tamen bela ebleco kunsidi en la plej vasta aŭditorio de la mondo: ĉiu en sia preferata sofo, en sia hejmo. Jes, en sia hejmo! Mi klarigas. Lastatempe la signalo de ĈRI fariĝis denove bonega. Ĝi kaŭzas plezuron aŭskulti la modelan prononcon de ties geparolistoj kaj Roza, de la antikva skipo, daŭras aktiva.

Jen mia lasta raporto por la ĈRI-estraro:

28-01-02 11,00 UTC QRG 07150 Khc S-1 (En skalo de nulo ĝis 9)
28-01-02 11,00 " " 07170 " S-6 - Ĉeftemo: pri la UKE en Pekino 2004.

07-02-02 11,00 UTC " 07150 " S-1
07-02-02 11,00 UTC 07170 S-9+ Parolistino, Roza, - Afgana ambasadejo restarigita. – 11,20 signalo S-5. – Temo Poŝtelefono surtabla, aŭdebla en apuda ĉambro.

11-02-02 07150 S-2
11-02-02 07170 S-9+ - Temo, Novjara Festo de Ĉinio komenciĝas morgaŭ.

12-02-02 07150 S-2
12-02-02 07170 S-9+ - Temo, Lanterna festo (unu semajo).

13-02-02 07150 S-nulo
13-02-02 07170 S-9+ - Temo, Printempa Festo Novjara dum tuta semajo.

Do miaj karaj kompanoj de la ĉiumonata kunsido, ne lasu vin rikani pro valoro malpli alta ol 20 USD por radioricevilo. En ĉi Jaro de la Kulturo kaj de la 87ª UKE, tuj akiru la radion, mem konstatu kiom bone vi povos aŭdi niajn laboremajn ĉinajn gesamideanojn, por ankaŭ vi, iam-tiam sendi al ili raporton kaj tiel prestiĝi ilin antaŭ la ĉina Registaro.

Oportunaj GAŬĈAJ DIRAĴOJ.

Pli kaŝita ol orelo de monaĥino – Pli malnova ol skizo de la Malnova Testamento – Pli senemocia ol danci kun sia fratino – Pli enpensiĝinta ol pastro – Pli ekstera ol ĉapelrimeno.

SCIIGO

Ĉerpita el Novaĵo Tamtamas, de teksto (resume) far Renato Corsetti: Samideano kiu volas apogi E-kurson por afganaj intelektuloj en la najbarlandaj rifuĝejoj, devas sendi, per kutimaj pagmanieroj monon al la konto AZIA FONDAĴO ĈE UEA kun la indiko 'LINGVO DE PACO-1"

ESPERANTO BRILAS EN LA MONDA SOCIA FORUMO

Okaze la de la 2a Monda Socia Forumo, realigata en Porto Alegre inter 31/1 kaj 5/2/02, la esperanta movado de la regiono kaptis la unikan okazon por gravega diskonigado de nia transnacia lingvo, sub la aúspicioj de BEL/UEA kaj la valora apogo de GEA. Sekve oni prezentas resumon de la chefaj okazintajhoj:

- Esperanto en marshadoj - En la 31/1, grandioza marshado tra la stratoj de Porto Alegre, kun ch. 50.000 partoprenantoj, estis la unua programero de la Forumo. Esperantistoj en konsiderinda nombro partoprenis en ghi portantaj slogan-tukojn kaj distribuantaj fald-folliojn. La 4/2 oni ankaù partoprenis en la marshado kontraù ALCA.
- Prelego che ADUFRGS - En la 1/2, instr. César Dorneles Soares partoprenis che la sidejo de ADUFRGS-Associação de Docentes da UFRGS en la ateliero *Por uma nova Babel: tradução e tradutores no mundo "global"*.
- E-ateliero en la Forumo - En la 2/2, che PUC, oni realigis la atelieron *A Língua Internacional Esperanto como Instrumento de Promoção da Paz*. Chirkaù 120 homoj ankaù eksterlandaj estis informitaj pri la celoj de E-o. Prelegetis en tia oportuno Luiz Fernando Puhl, Marcelo Stoduto, César Dorneles Soares, Maria da Glória Geyer kaj José Alzemiro Pacheco.
- Esperanto kaj la amas-komunikiloj - Diversaj intervjuoj pri E-o estis donitaj dum la Forumo al jhurnalistoj laborantaj en la evento. Inter ili oni elstarigu: al *Corriere della Sera* (Italio), al *Le Monde Diplomatique* (Francio), al la novajh-agentejo *Associated Press* (Britio), al la radio-stacio *France International*, al la radio-stacio *Attac-Stuttgart* (Germanio), al la transnacia *Radikala Partio*, al la brazila tag-gazeto *Folha de S.Paulo*, al la gaùcha televid-stacio TVE (du-foje, vive) ktp, ktp.

Aparte grava kaj ghojiga por la esperantistaro de la regiono estis la partopreno de S-anino Clair Leuffenburger-Simon, el Selestat, Francio, veninta speciale por partopreni en la MSF. Lernanta E-on de nur 3 monatoj, shi jam sukcesas minimuman komunikighon en la lingvo kaj ravis al chiuj pro sia afableco kaj diligenteco.

Fine, oni povas diri nedubeble, ke la diskonigado de E-o che la 2a MSForumo eniras en ghian historion kiel unu el la plej gravaj momentoj en kiuj E-o vokis la atenton de miloj da homoj - multaj el ili influpovaj en siaj respektivaj kampoj de agado.

Far César Dorneles Soares, speciale por *Gisto*

DEZIRATA VEKIĜO

Ulo bonfartas, festas sian naskotagon kune kun aro da geamikoj invititaj al sia domo. Post riĉa vespermanĝo, sekvas gaja rondo kun rakontoj, kantoj kaj spicitaj anekdotoj ĉe glaseto da konjako. Ĉirkaŭ noktomezo li adiaŭas la amikaron. Plenkontenta li iris al sia dormoĉambro kaj baldaŭ endormiĝas en sia mola lito. Sekvan matenon li vekiĝas, rigardas ĉirkaŭen kaj vidas fremdulon starantan apude. Li demandas: Kiu estas vi ? – La fremda figuro afable diras al li: trankviliĝo. Ĉio en bona ordo. Mi estas Sakta Petro. Bonvenon !

MEMORIGILO

POR Homoj kiuj ne frekventas la e-reton: apogi la enkondukon de la DM-loto, dum la 87a UKE, tra la Posto, per la adreso LKK-estraro de la 87a UKE – Av. Pe. Antônio Tomás, 3155/701-Coció 60199-020 FORTALEZA-CE.